

Augustin Wibbelt,

## Vespera ruĝo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Post sunsubir' ĉe la ĉiel'  
Luks-plenas roz-ĝarden'.  
Nebul' sin levas, nokt-malhel'  
En forsto kaŝas sin.

La pasintec', leviĝas ĝi  
Kun ĝoj- kaj malĝojad'.  
Malnovan linon ŝpinas mi,  
Ne haltas mia rad'.

*Traduko de la Basgermana poemo "Aobendraut" de AUGUSTIN WIBBELT (\*1862-09-19 – †1947-09-14) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1984-12-30.*

*MR-169-1 / Arg-681-1371 (2012-11-26 08:25:47)*

*Profesoro d-ro Hans Taubken, kunlaboranto kaj estrarano de la societo "Augustin Wibbelt", afable permesis al mi, Manfred Retzlaff, per retlete-ro de l' 30.04.2008 la enretigon de miaj tradukoj de poemoj de Augustin Wibbelt. Vidu ankaŭ la retejon de la societo "Augustin Wibbelt": <http://www.muenster.org/wibbelt/>.*

Augustin Wibbelt,

## Aobendraut

De Sunn is wägg, an'n Himmel ligg  
En Rausengaor'n vull Pracht.  
In bleeke Wiesk de Niewwel stigg.  
In'n Busk do luert de Nacht.

Nu kŭmp harup, wat fröher was,  
Half trurig un half froh.  
Ick sitt un spinn da aolle Flass,  
Min Rad läöpp ümmerto.

*Verkinto de tiu ĉi Basgermana poemo estas AUGUSTIN WIBBELT (\*1862-09-19 – †1947-09-14), publikigita 1984-12-30.*

*MR-169-1 / Arg-681-1369 (2012-11-26 08:13:11)*

*Herr Professor Dr. Hans Taubken, Beisitzer und Mitglied des Vorstands der Augustin-Wibbelt-Gesellschaft hat mir, Manfred Retzlaff, mit Netzschreiben vom 30.04.2008 freundlicher Weise gestattet, meine Esperanto-Übertragungen von Gedichten Augustin Wibbelts in meine Internet-Gedichtsammlung [www.poezio.net](http://www.poezio.net) aufzunehmen. Siehe auch: <http://www.muenster.org/wibbelt/>.*